

## INFORMACIJE

## INFORMOJ

Leto / jaro 29, št. / n-ro 4

december / decembro 2024

Uvodnik

Frontartikolo

Iz dejavnosti ZES

El la agado de SIEL

Ĉi tiu numero markas la finon de la 29-a jaro de nia bulteno *Informacije / Informoj*. La unua numero estis eldonita en majo 1995 kaj konsistis el 2 paĝoj. La volumo estis pli granda ol 2 aŭ 4 paĝoj unufoje en oktobro 2006. Ekde novembro 2012, la volumo ĉiam estis 8 aŭ pli da paĝoj, kaj la maksimumo estis 20 paĝoj en septembro 2019. Ekde la komenco la enhavo estas prezentata en du kolumnoj.

La nuna aranĝo de la bulteno kaŭzas kelkajn problemojn. Necesas plurfoje dividi la vortojn por eviti grandajn malplenaĵojn en la teksto. Ĉar ni ankaŭ volas iomete pliigi la grandon de la literoj, tio kaŭzos aldonan problemon. Do ni provos alian aranĝon de tekstoj: unu kolumno kun ambaŭflanka rektigo de teksto kaj tiparo 12 anstataŭ 11. Pli granda larĝo de kolumno ankaŭ permesas pli grandajn bildojn. Alie, la kaplinio kaj kolofono de la informilo restas la samaj, same kiel la tiparo *Calibri*. Ni daŭre provos verki kiel eble plej multe da teksto en Esperanto, sed kie necese, la resumo estos en la slovena aŭ en Esperanto.

S to ŝtevilko se konĉuje 29. letnik naŝega glasila *Informacije / Informoj*. Prva ŝtevilka je izŝla maja 1995 in je obsegala 2 strani. Veĉji obseg kot 2 ali 4 strani je bil prviĉ oktobra 2006. Od novembra 2012 je bil obseg vedno 8 ali veĉ strani, najveĉ 20 strani pa septembra 2019. Od vsega zaĉetka je bila vsebina predstavljena v dveh stolpcih.

Sedanja postavittev ĉasopisa povzroĉa nekatere teŝave. Veĉkrat je treba deliti besede, da se izogne-mo velikim prazninam v besedilu. Ker ŝelimo tudi malo poveĉati velikost ĉrk, bo to ŝe bolj izrazit problem. Zato bomo poskusili z drugaĉno postavitvi-jo besedil: en stolpec z obojestransko poravnavo ter velikost ĉrk 12 namesto 11. Veĉja ŝirina stolpca omogoĉa tudi veĉje slike. Sicer pa ostaneta glava in kolofon glasila enaka, prav tako tip ĉrk *Calibri*. Ŝe naprej se bomo trudili napisati ĉimveĉ besedila v esperantu, kjer pa je potrebno, bo povzetek v slovenŝĉini oziroma esperantu. **O.K.**



ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE • SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

## Novjara alparolo de la prezidantino de SIEL Anka Vozliĉ

Karaj geesperantistoj kaj amikoj de Esperanto, proksimiĝas fino de la jaro, festotagoj kaj tempo kiam oni ordinare iomete alrigardas reen kaj preparas novajn celojn.

Se ni alrigardas en la 2024-an, ni povas diri, ke ni sukcesis. Nia eksprezidanto estis en serioza sansituacio, lia sano estas pli bona kaj li povos helpi al ni per sia sperteco por kio ni estas tre dankaj. Samtempe ni devis trovi novan prezidanton, kio estis tre grava tempo por nia organizo. Aspektis neeble, sed finfine per kunlaboro ni sukcesis solvi la problemon. Nia Ligo daŭrigas laboron, por kio ni devas aparte danki al Ostoj Kristan, la sekretario de SIEL, kaj al la membraro de labororganoj. Do ĉio funkcias.

Ni en granda nombro kaj gaje partoprenis Zamenhofan tagon en Izolo, kiun preparis la sekcio el Izolo sub la gvidado de Peter Grbec kaj ĝi estis rimarkita de ĵurnalistoj kaj Esperanto estis denove menciita en radio, televido, eble eĉ ie alie. Tre surpriza estis la ekspozicio de Zamenhof portretoj surstrate kaj informfolioj pri la festotago en lokaj kafejoj, memorŝtonetoj koloritaj kiel Esperanto-flagetoj, kion preparis Luĉka Leŝnik. Tiu kreema ago estas tre ripetinda.

La aĝoprofilo de niaj movadanoj estas tro alta, mankas gejunuloj. Ni daŭre klopodu aligi ankaŭ junajn gemebrojn.

Komence de julio ni aktivis en Nova Gorico kie ni kunorganizos Alp-Adrio-Konferencon kaj mi jam nun invitas vin rezervi tempon por partopreni ĝin. Ĉiun informojn vi ricevos ĝustatempe.

Vi ĉiuj estas invitataj al aktiveco laŭ viaj kapabloj. Povas esti simpla paŝo – veni en la klubojn, doni ridon al homoj, babilu kun ili, trinki ion kune, kanti,

ludi ludojn, lerni lingvon, instrui ĝin, prepari prelegon, legi Informojn, aliajn artikolojn, libron, aŭ verki ĝin. Vi povas esti kreema en io ajn, ni kune povas krei bonan etoson en niaj Esperanto-rondoj kaj en nia movado, kiu devus aparteni al ni ĉiuj, ĝi povos iom post iom denove kreski. Ĉu ni sukcesos tion fari en 2025?

Kaj por la fino mi invitas vin revii, esperantumi. En festotagoj mi deziras al vi pacon, gajecon kaj esperon je pli hela estonto kaj mi tostas je via sano, longviveco kaj energio. Feliĉan jaron 2025!

## Zamenhofa Tago 2024 en Izolo

Post la decido de la PK de SIEL, ke la ĉijara komuna slovena celebrado de la 165-a naskiĝdatreveno de L. L. Zamenhof kaj de la Tago de Esperanto-kulturo kaj de la Tago de Esperanto-libro okazos en la Intergeneracia Centro en Izolo, Peter Grbec kaj liaj kursanoj kaj aliaj esperantistoj kaj subtenantoj, kiuj konsistigas la Esperanto-sekcion »Bordo«, vigle komencis prepari diversajn logistikajn aranĝojn kaj programerojn de la festado. Oni anoncis la eventon per la Eventa servo, Fejsbuko, slovena kaj esperanta afiŝo, retroŝta cirkulero kaj rekta invitado.

## ZAMENHOFA TAGO – TAGO DE ESPERANTO-KULTURO

KIE? INTERGENERACIA  
CENTRO EN IZOLA  
(SLOVENUJO)

Ĵaŭdon, la 12an de  
decembro 2024.

15.00 - 17.00.  
**BONVENON!**



La Esperanta versio de la afiŝo

En la salono de Intergeneracia Centro en Izolo amasiĝis pli ol 40 partoprenantoj, ĉirkaŭ duono el ili ankaŭ kontribuis almenaŭ unu eron al la bunta kaj ampleksa programo. Kvar gastoj venis el Aŭstrujo kaj Italujo. Pro la ĉeestantoj, kiuj ankoraŭ ne komprenas Esperanton, la plejmulto da tekstoj estis interpretataj en la slovenan.

La programo komenciĝis per la kadra skeĉo »Konsilu al mi sinjoro Zamenhof«. Denis Marion en la rolo de Zamenhof, provizore forpermesita el la infero (»punita pro la enkonduko de akuzativo en Espe-ranton«), interparolis kun Peter Grbec, la

mentoro de la sekcio, kaj interpretis en la slovenan, montrante kiel bone li jam ellernis nian nacian lingvon.



La kadra skeĉo (Foto A. Ĵ. S.)

La nova prezidantino de SIEL Anka Vozlič mallonge alparolis kaj salutis la ĉeestantojn.



Alparolo de la prezidantino de SIEL (Foto A. Ĵ. S.)

Peter mallonge prezentis la agadon de la Esperanto-Sekcio en Izolo: la kurso, ekzamenoj, subtekstado de slovenaj filmoj, tradukado ktp. La kursanoj kantis kaj recitis kelkajn poemojn. La okaza ĥoruso nomiĝis »Sonja Tavĉar«, omaĝe al la konata instruistino de Esperanto, kiu agadis en la regiono.



La kamiŝibajistinoj kun Anita Urbanĉiĉ de Radio Koper (Foto A. Ĵ. S.)


Dragica Ropret Ĵumer kaj Vesna Marion prezentis kvin kamiŝibaj-teatraĵojn por infanoj. Intertempe Peter kaj Rožana Špeh recitis la poemon de Simon Gregorčič *Nazaj v planinski raj* en la slovena kaj en Esperanto (Vidu la *Beletran angulon!*).

La fama muzikisto Drago Mislej, alie Mef, prezentis sian popularan kanzonon *Pesem, ki je ni unue* en Esperanto, nun nomata *Neestanta kanto*. La plena salono vigne kantadis la refrenon kun la gitaristo.



*Neestanta kanto* kaj Mef (Foto O. K.)

Vinko Oŝlak, la aŭtoro de la premiita romano *Pismo Philemonu*, respondis kelkajn demandojn pri la nova romano kaj pri la Esperanta versio *Epistolo al Philémonos*. Ambaŭ libroj aperis en 2024 en Ljubljano.



Vinko Oŝlak pri la *Epistolo al Philémonos* (Foto O. K.)

Pri la infanlibro *Fabeletoj por formiketoj* parolis la eldoninto Mario Vetrih. La bildolibro aperis en la slovena kaj en Esperanta versio ĉijare en Mariboro.

La esperantistaj geedzoj Janez kaj Ana Ferrer Zadavec diris kelkajn vortojn pri sia 50-jara edzeco kaj dumviva sindediĉo al la Esperanto-movado kaj Esperanto-etoso. Janez specife salutis la gekolegojn Mira Lipičar, Anka Vozlič, Vinko Oŝlak, Janez Jug, Ostoj Kristan kaj Peter Grbec kaj dankis ilin pro ilia kontribuo al la movado.

Post la programo oni turnis atenton al la tabloj en la salono. Iuj tabloj oferis librojn, poŝtmarkojn, memoraĵojn ktp. Lučka Leŝnik aŭtoris du poŝtkartojn, kiuj rilatas al la festo: unu el ili enhavas la tekston de la poemo *Libera / Svobodna*, deklamita dum la programo, la dua la foton de Izolo kun la datumoj de la festado.



»La majstro« komencis tranĉi la kukon (Foto O. K.)

La naskiĝdatrevena kuko, ornamita per la numero 165, kaj aliaj bongustaĵoj tute konsumis la atenton de la publiko. Post nelonga tempo la plado de la kuko faŭkis vaka. Sed, ne timu, bongustaĵoj kaj trinkaĵoj abundis, oni alportis ankaŭ varmajn picojn, oni malfermis kun laŭta krako botelojn de ŝaŭmvino.

Fine Lučka Leŝnik gvidis la dekon de tiuj, kiuj ne laciĝis, tra la vesperaj, sed bele ornamitaj, stratoj de la urbocentro de Izolo. En kelkaj lokoj la portretoj de Zamenhof kaj afiŝoj atentigis la pasantojn pri la esperantista agado kaj la evento en la Intergeneracia centro. Vere, la Esperanto-sekcio el Izolo faris elstaran impreson kaj montris sinceran gastigamon. **O.K.**



Artista anonco de la festo en Izolo (Foto L. L.)

## Druga in tretja seja IO ZES

Resumo de la protokoloj de la dua kaj la tria sesio de la PK de SIEL la 9-an de oktobro respektive la 3-an de decembro 2024. Oni kunvenis virtuale per la reta aplikaĵo Zoom.

Druga seja Izvršnega odbora ZES je bila 9. oktobra 2024 kot videokonferenca na platformi Zoom. Gostitelj je bil Janez Jug. Seje so se udeležili vsi člani IO ZES.

Odbor je obravnaval priprave na konferenco Alpe-Jadran leta 2025 v Novi Gorici. O poteku zadevnega sestanka v Trstu so poročali udeleženci Grbec, Rožej in Kristan. Odbor je podprl organizacijske načrte in pozdravil pripravljenost EDL za finančno in logistično podporo projektu. Odbor je tudi izrazil pripravljenost za soorganizacijo s FEI evropskega kongresa esperantistov 2026 v Gorici in Novi Gorici.

Odbor je sprejel ponudbo sekcije Obala, da v Medgeneracijskem centru Izola organizira osrednjo slovensko proslavo Zamenhofovega dne in Dne esperantske kulture. Zaradi možnosti obiska še drugih proslav na Dunaju, v Trstu itd. je bil določen datum slovenske proslave 12. december 2024.

Tretja seja IO ZES je bila 3. decembra 2024. Sejo je kot običajno gostil Janez Jug po Zoomu. Na seji je bilo prisotnih šest od sedmih članov IO.

Odbor se je seznanil s pripravami na Zamenhofov dan v Izoli, s počasnim napredkom priprav na konferenco Alpe-Jadran ter drugim delom. Odbor je odobril finančno podporo za prireditev v Izoli ter stroške za knjige, pisarniški material in podobno. Odbor je tudi odobril subvencijo za EDL pri načrtovani nabavi projektorja in platna za predavanja in tečaje. Višina subvencije bo v okviru možnosti glede na prosta sredstva ZES ob koncu poslovnega leta. **O.K.**

## La arĥivo de SIEL

La arĥivo de SIEL alprenas sian finan formon. La unua el du ŝrankoj jam plenas. Oni povas rapide kaj senstreĉe atingi la deziratan unuon de la arĥivo. Ni planas ekfunkciigi la arĥivon kune kun la katalogo meze de la jaro 2025.

Urejanje arhiva ZES postopno napreduje. Iz preko sto večjih ŝkatel različnih vrst iz različnih začasnih skladišč je bilo treba najprej izločiti gradivo za knjižnico, to je knjige in revije. Posebej so spravljeni še razni predmeti muzejske vrednosti, od zastavic, nalepk, slik in plaket do pisarniške opreme. Arhivski dokumenti so bili delno urejeni v fasciklih in mapah, mnogo pa je bilo nametane po ŝkatlah tako, da je bil prostor v ŝkatli med transportom ĉim bolje izkoriŝćen. Gradivo je delno poŝkodovano, plesnivo, nagrizeno itd., predvsem pa moĉno zapraŝeno.

Arhivsko gradivo bo po novem leĝalo v rvajih kartonskih ŝkatlah za format A4 viŝine 8,5 cm. Ŝkatle so nekoliko daljŝe in ŝirŝe od listov A4, tako da dopuŝĉajo tudi hranjenje dokumentov v nekaterih vrstah map. Fascikli bodo sluĝili ŝe naprej za hranjenje in razvrŝĉanje dokumentov, ki so v vsakodnevnri rabi.

Razvrŝĉanje gradiva je prilagojeno naŝim potrebam in specifiĉnosti zgodovine esperantskega gibanja pri nas. Glavna ĉasovna razdobja so ĉas pred koncem druge svetovne vojne, razdobje 1946 do 1976 (Zveza esperantistov Slovenije), razdobje 1976 – 1998 (ZDMJES) ter ĉas od 1998 do sedaj (ZES).

Po temاتيki pa so v posameznih razdobjih opredeljene dejavnosti kot na primer temeljni organizacijski akti, zapisniki obĉnih zborov, delo organov, komisij in sekcij, administracija, veĉji programi in projekti itd. Taki programi so na primer Pedagoŝko-didaktiĉni eksperiment, Inŝtitut za esperanto, La Suda Stelo, Slovenia Esperanto-Junularo itd.

Loĉeno so zbrani dokumenti drugih esperantskih organizacij v Sloveniji, saj je znano, da so bili nekateri njihovi arhivi uniĉeni ali zavrĉeni. Ĉe bo kdo ŝelel prouĉiti zgodovino esperanta na primer za Koper, bo pregledal ustrezno enoto naŝega arhiva.



La ofica ŝranko enhavas 57 skatolojn, ĉirkau unu duonon de la arĥivo de SIEL (Foto O. K.)

Posebej so obravnavani ŝe segmenti UEA, TEJO, SAT, ILEI, Alpe-Jadran, odnosi z jugoslovansko in republiĝkimi organizacijami, sosednje drĉzave, pa posamezne vidne osebnosti kot na primer Joŝe Kozlevĉar, Peter Zlatnar, Sonja Tavĉar itd.

Katalog arhiva bo na dispozolago na spletiŝĉu ZES. Vseboval bo strukturo arhiva, nazive fascikloj in arhivskih ŝkatel ter grobo vsebino vsake enote. Arhiv bo pripravljeno za uporabo do srede leta 2025. Seveda pa se bo urejano in dopolnjevano nadaljevato glede na potrebe in nove pridobitve gradiva. **O.K.**

Iz dejavnosti EDL

El la agado de ESL



**ESPERANTSKO DRUŝTVO LJUBLJANA**  
**ESPERANTO-SOCIETO LJUBLJANA**

### Vesele urice v Kranju

Kroŝek esperanta v Medgeneracijskem centru v Kranju poteka ŝe nekaj let. Zdato se je ustalilo termin

vsak torek ob 18. uri. V prijetnem okoloju ni samo uĉenoje jezika, ampaĝ zlasti druŝenoje prijateljev. Udeleŝenci so prihajali, se bolj ali manj redno udeleŝevali teĉaja in drugih dogodkov, pa tudi zapuŝĉali kroŝek, le Nika Roŝej je stalnica in duŝa kroŝka. V naĉrtu je medsebojni obisko kroŝkov v Ljubljani in Kranju. **O.K.**



Esperanto-rondo en Kranj (Foto O. K.)

Iz dejavnosti EDM

El la agado de ESM



**ESPERANTSKO DRUŝTVO**  
**ESPERANTO-SOCIETO**  
**MARIBOR**

### Vizito en Graz

Post la reestablo de kontaktoj inter la Esperanto-Societo en Graz kaj la Esperanto-Societo Mariboro en aŝgusto ĉi-jare, ni, membroj de la mariboro asocio, la 26-an de oktobro vizitis Grazon.

La Graza esperanta societo ŝus akiris novajn lokojn en la Urbodomo kaj ricevas konkretan financan subtenon de la urbo. La ejoj situas en pitoreska ĉirkaŝaŝo, kiun ni povis sperti dum la vizito.

Al Graz alvenis du grupoj el Slovenujo: kvarpersona grupo el Izolo, gvidata de Peter Grbec, kaj kvinpersona grupo el Mariboro sub la gvido de la prezidanto de ESM, Mario Vetrih. La gastigantoj el Graz, kvarpersona teamo gvidata de Ewald Schick, bonvenigis nin varme.

Post agrabla kunveno kun varmaj trinkaŝoj en la ĉambroj de la societo, ni interŝanŝis informojn kaj donacis al la gastigantoj kelkajn librojn. Poste Ewald kondukis nin al la malnova urbotombejo (Zentral-

friedhof Graz) ĉe la Triesta Vojo, kie estas entombigita Henrik Haas, la fondinto de ambaŭ esperantaj asocioj en Graz kaj en Mariboro. Ni eksciis, ke la Graza asocio prenis respondecon pri la prizorgado de la tombo de Haas por la venontaj dek jaroj.



Antaŭ la tombejo de Henrik Haas

Post la vizito al la tombejo, ni daŭrigis nian ekskurson al la urbocentro. Ni promenis de la bordo de Muro ĝis Jakomini-placo (Jakominiplatz), kaj poste laŭ la strato Herrengasse ĝis la ĉefa placo (Hauptplatz). Survoje ni haltis ĉe la Landa Domo (Grazer Landhaus), bela renesanca palaco kun arkadoj. Ĉe ĉiu halto, Ewald informis nin pri interesaj faktoj kaj historiaj detaloj.

Por konkludi, ni revenis al la Urbodomo, kie ni ĉeestis koncerton de la koruso Pinko Tomažič el Triesto, kiu riĉigis nian kulturen programon. Fine ni interkonsentis pri estonta kunlaboro. Ni verŝajne kune partoprenos la Zamenhofan Tagon en Vieno en decembro ĉi-jare, kaj sendube ni renkontiĝos ankaŭ ĉe la aŭstra kongreso, kiu okazos en Graz komence de majo 2025. **Fonto: Retejo de ESM**

Darinka S., kursanino el Maribor, tiel vortpentris la eventon:

### Renkontiĝo de esperantistoj el du najbaraj ŝtatoj

Sabaton, la 26-an de oktobro 2024, la esperantistoj de la urboj Mariboro, Izolo kaj Graz havis renkontiĝon en Graz.

Kiam ni alvenis, salutis nin la prezidanto de Grazaj esperantistoj sinjoro Ewald. Dum tio mi kaj kolego el Izolo trinkis kafon kaj teon.

Poste ni piede iris al la malnova urbo kaj rigardis vidindaĵojn. Dum ni marŝis, nia gvidanto interpretis

la historion de diversaj objektoj. Mi malbone komprenis tiun klarigon, ĉar mi ne havas necesan vortprovizon. Li ankaŭ tre rapide parolis. Ĉi-tio min kuraĝigis por plua lernado de Esperanto.

Ni tagmanĝis en malnova gastejo. Mi manĝis specialan salaton konsistantan el terpomoj, verdaj faboj, fandita fromaĝo kaj lardo. Mi ŝatis manĝi tian salaton.

Je la 14-a horo ni forveturis per la urba tramo ĝis "Popola domo", kie ni ĉeestis koncerton. Estis la koncerto de la Partizana koruso "Pinko Tomažič" el Triesto. Ili kantis slovenajn, jugoslavajn kaj italajn partizanajn kantojn, kiel ankaŭ kantojn de ribelo kaj lukto de aliaj nacioj. Mi estis tre altirita de ĉi tiu entuziasma kantado. Ĉar mi bone konas kelkajn kantojn de miaj elementlernejaj kaj mezlernejaj tempoj, tial mi ekkantis kune kun la koruso.

Je la 16.30-horo ni reveturis hejmen.

## Ombro sur interna pejzaĝo

Esperanto-Societo Maribor organizis la 12-an de novembro 2024 literaturan eventon en la unika medio de la Juĝturo apud la rivero Dravo, kadre de la Biblioteka Ciklo de la Universitato por la Tria Vivperiodo de la Maribora Biblioteko. La ĉefa programero estis la prezento de la slovena traduko de la romano *Ombro sur interna pejzaĝo* (slovene: Senca nad pokrajino duše), verkita de la renoma Esperanta aŭtorino Spomenka Štimec. La romanon tradukis el Esperanto al la slovena Vinko Ošlak, konata slovena verkisto, tradukisto kaj filozofo.

En la nomo de la Maribora Biblioteko, la ĉeestantojn salutis s-ino Nataša Konec, la gvidantino de la Biblioteka Ciklo de la Universitato por la Tria Vivperiodo.

La eventon gvidis Vinko Ošlak, kiu enkondukis la aŭtorinon kaj kun ŝi diskutis pri la enhavo kaj signifo de la romano, samtempe tradukante ŝiajn respondojn el Esperanto al la slovena. Komence de la kunveno, Ošlak klarigis sian profundan ligan al Esperanto, kiun li nomas sia "lingvo de patrujo." Li rakontis, ke li komencis lerni la lingvon je 16-jara aĝo kaj ankoraŭ aktive uzas ĝin, kaj por krei originalajn verkojn kaj por traduki klasikaĵojn de la slovena literaturo (ekz. Srečko Kosovel, Prežihov Voranc, Ivan Cankar) al Esperanto, same kiel Esperantajn verkojn al la slovena.

Spomenka Štimec mem voĉlegis elĉerpaĵojn el sia romano, dum Ošlak prezentis paralelajn tradukojn en la slovena. La romano enhavas profundajn aŭtobiografiajn elementojn, esplorante intimajn

sentojn kaj la internan serĉadon de feliĉo. Oŝlak priskribis la verkon kiel unu el la plej gravaj en Esperanta literaturo, komparebla al la klasikaj verkoj *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz kaj *Metropoliteno* de Vladimir Varankin.

Post la prezento de la romano, Ŝtimec parolis pri la forgesita maribora esperantisto Leo Novak, konata komponisto kaj tradukisto, kiu tradukis verkojn de Oton Župančič al Esperanto. Novak, kiu estis murdita de la Gestapo en oktobro 1941, estis la onklo de la slovena poeto Boris A. Novak.

Kiel parto de la evento, Spomenka Ŝtimec transdonis kelkajn ekzemplerojn de la bengala traduko de la libro *Hotel sem prijete sonce* (Mi volis tuŝi la sunon) de Tone Partljič, publikigita en 2008 en Kalkato. Per tio, ŝi montris siajn longdaŭrajn kulturajn ligojn kun Slovenio. Ŝtimec delonge agas kiel ambasadorino de la slovena lingvo kaj literaturo en la Esperanta mondo.

Ĉirkaŭ 30 aŭskultantoj partoprenis la eventon, ĝuante la riĉan esperantan kulturon, la tradukan laboron de Vinko Oŝlak kaj la vivoverkon de Spomenka Ŝtimec. La evento klare ilustris, kiel la universala lingvo Esperanto konektas popolojn kaj literaturojn.

Pli pri la evento skribis Vinko Oŝlak: <https://esperanto-maribor.si/kultura-evento-kun-spomenka-stimec-la12an-de-novembro-2024-maribor/>

Fonto: Retejo de ESM

Iz dejavnosti KD SG


El la agado de KS SG

### Predstavitev *Pisma Philemonu*



Vinko Oŝlak je 5. novembra 2024 predstavil svoje novo delo *Pismo Philemonu / Epistolo al Philémonos* v knjižnici Ksaverja Meška v Slovenj Gradcu. Zbralo se je veliko poslušalcev, med njimi tudi esperantisti iz regije.

Za slovensko verzioj romana je mag. Oŝlak leta 2023 prejel nagrado Svetlobnica ljubljanske založbe Družina. Nagrado je namenil za tisk svojega prevoda romana v esperanto, ki je nato letos hkrati izŝel v obeh različicah. **D.J.**



Prezento en la Biblioteko Ksaver Meŝko en Slovenj Gradec

Komentiramo

Ni komentas

Janez Zadavec Klugler:

### Dudek kvar lingvoj, unu Eŭropo

Ni ĵus vidis francan dokumentaron kun ĉi tiu titolo en TV Slovenija. La enhavo proponas al ni bonegan ŝancon klarigi la diferencon inter la koncepto de lingvodemokratio kaj lingvopolitiko.

Estas tradukservo en Bruselo kun preskaŭ du mil dungitoj, kiuj liveras realtempan paroltradukon kaj tradukas pli ol milionon da paĝoj de dokumentoj ĉiujare. Tiel la politikistoj de Konsilio de Eŭropo, Eŭropa Parlamento kaj Eŭropa Komisiono estas rajtigitaj paroli en sia gepatra lingvo kaj, per traduko, kompreni ĉiujn aliajn parolantojn. Kelkaj homoj hontas pri sia gepatra lingvo kaj parolas en la angla, sed ĉi tio estas pli reflekso de persona (ne)libereco. La pintkunveno de Eŭropa Unio povas do esti modelo por la realigo de la lingva demokratio.

Kio pri ni, civitanoj de Eŭropa Unio? Ĉu vi forgesis ĉiujn rekomendojn pri multkultureco, plurlingveco, lernado de almenaŭ du fremdaj lingvoj? Ni slovenoj estas konataj pro nia talento por lingvoj kaj nia volo submetiĝi. Ĉu vi scipovas la italan, aŭ la germanan, aŭ la hungaran, aŭ la kroatan (ne serbokroatan, mi petas!)? Se vi ne konas almenaŭ du el tiuj najbaraj lingvoj, tiam vi ne respektas la rekomendojn de

politikistoj el Bruselo. Sed ĉiu havas ion, politikistoj en Bruselo havas funkciantan lingvan demokration, sed ni civitanoj havas rekomendojn kaj nefunkciantan lingvan politikon.

En Slovenujo ni ĵus memoras pri Primož Trubar, la fondinto de la slovena skribita lingvo. Kaj ĉi-jare ni decidis plifortigi la slovenan per la angla. Tial ekde nun ĉiuj slovenaj infanoj, ekde la unua klaso, lernos la anglan krom la slovena. Kelkaj el ni timas, ke tiu ĉi dulingveco transformiĝos en la anglan unulingvecon, kio malhelpos la evoluon de teknologio, kaj la timo estas nenecesa. Jam estas vendataj voĉaj tradukiloj, kiuj tradukas al ajna lingvo senprokraste. Do, post kelkaj jaroj, niaj infanoj parolos al la tradukilo en la angla, kaj la tradukilo tradukos al la bela slovena!

Primož Trubar povas ripozi trankvila, ĉi tio estas mirinda nova mondo kun lingva demokratio, lingvopolitiko kaj ... Ĉu iu diris ion pri lingva koloniismo kaj ion pri sklavoj?

Leposlovni kотиček

Beletra angulo

Simon Gregorĉiĉ (1844-1906), katolika pastro, verkis lirikan poezion, esprimante amon kaj estimon al la naturo kaj la rustika vivo. Lia plej fama poemo estas *Soĉi* (Al la rivero Soĉa).

La poemon *Nazaj v planinski raj* (Reen al paradiz' montar') esperantigis Peter Grbec por celebri la 180-an naskiĝdatrevenon de la poeto.

Konforme al la redakta politiko, poemoj kaj tradukoj de poemoj publikigitaj en nia bulteno ne korektatas. Por la teksto repondecas la aŭtoro.

Simon Gregorĉiĉ:

### Nazaj v planinski raj – Reen al paradiz' montar'

*Pod trto bivam zdaj  
v deželi rajskomili,  
srce pa gor mi sili  
nazaj v planinski raj: –  
zakaj nazaj?  
Nazaj v planinski raj!*

*Sub vito loĝas mi,  
en land' Edensimila,  
sed la kor' reven-sopira,  
revas reen al montar': –  
kial reen al?  
ties paradiz' la kial'!*

*Tu zelen dol in breg,  
tu cvetje že budi se,  
tu ptiĉji spev glasi se,  
gore še krije sneg, –  
zakaj nazaj?  
Nazaj v planinski raj!*

*Tie verda kamp' kaj bord',  
tie floroj jam vekiĝas,  
tie kant' de bird' aŭdiĝas,  
la montojn ankoraŭ kovras neĝ', –  
kial reen al?  
ties paradiz' la kial'!*

*Glej ta dolinski svet,  
te zlate vinske griĉe,  
te nič, te nič ne miĉe  
njih južni sad in cvet?  
Zakaj nazaj?  
Nazaj v planinski raj!*

*Jen ĉirkaŭe verda val',  
jen oraj vinmontetoj,  
ne allogas vin ĝuetoj,  
ilia dolĉa frukt' kaj flar'?  
Kial reen al?  
Ties paradiz' la kial'!*

*In to ti nič ni mar,  
da dragi srĉno vdani  
ti kličejo: "Ostani,  
nikar od tod, nikar!"  
Zakaj nazaj?  
Ne vpraŝajte zakaj!*

*Kaj kia estaĵo estu,  
kiam amikoj viaj karaj,  
petas vin: »Restu,  
ne for, pri amikoj pensu!«  
Kial reen al?  
Ne demandu min kial'!*


*O, zlatih dni spomin  
me vleĉe na planine,  
po njih srce mi gine,  
saj jaz planin sem sin!  
Tedaj nazaj,  
nazaj v planinski raj!*

*Ho, memoraĵoj oraj mil  
trenas min al la montar',  
tie restis kor' kaj am',  
ĉar mi de mont' estas fil'!  
Tiam reen al,  
reen al paradiz' montar'!*



**Simona Klemenčič:**

## La domo sen speguloj



Dr. Simona Klemenčič je jezikoslovka, sodelavka Inštituta Franca Ramovša ZRC SAZU v Ljubljani. Eno od področij, katerim se posveča, so tudi umetni jeziki. Je tudi esperantistka, učiteljica esperanta in avtorica učbenika za dijake in študente *Intenzivni 30-urni tečaj*

*jezika esperanto* (ZOTKS, Ljubljana, 2015). Bila je tudi aktivna pri ZES v Slovenski esperantski mladini SEJ.

V letu 2022 je pri založbi *Litera* izdala futuristični roman *Hiša brez ogledal*. Zdaj je del knjige prevedla v esperanto in nam ga daje v pokušino. Deli tega prevoda bodo objavljeni tudi v naslednji številki revije *Beletra almanako*.



### Aŭgusto

(...)

Mi demetis miajn pantoflojn kaj eliris el la domo nudpiede. Ĉu estas aŭgusto aŭ ne? Sur la suna flanko la valeriano ĝardena obstine kreskis sub la vitra kovrilo. Mi kaŭris kaj levis la kovrilon de la varianelo. Ĝi aspektis bone, la plantoj persistis malgraŭ la temperaturo dumnokte falinta sub la frostopunkton. Mi sidiĝis sur la frostiĝantan benkon apud la ĝardena bedo. Miaj nudaj piedoj palpis la restaĵojn de herbaro.

Ĉu ĉi tio estos nun mia vivo, Dio? Ĉu tiel mi pruvu mian fidon?

»Kreskos ja nenio. Vi estas malŝparanta tempon,« la alta voĉo de mia najbaro Goriĉnik sonis scivola de la alia flanko de la barilo. Mi ekretemetis. Kiom longe li jam staris observante min de tie?

»Ĉu vi bezonas valerianelon, najbaro?«

La malgranda, senhariĝanta viro kun elstara ventro grimacis:

”Nun estas la tempo por neĝi, ne por salato. Se vi bezonas unu paron da manoj por forŝoveli la neĝon, voku min.”

»Ne estas hasto; la vintro ne venos ankoraŭ.«

»Ho jes, ĝi venos,« li konade kapjesis.

Dum mi estis revenanta al la domo, mi demandis min, kion li pensis, kiam li vidis min tian, kun nudaj piedoj. Mi estis kolera kontraŭ mi mem.

### Septembro

(...)

Krom la okaza aĉa komento de unu aŭ la alia el ni du virinoj, la vivo estis sufiĉe tolerebla, almenaŭ surface. Maca provis transpreni la regon, mi ne lasis tion, kaj mi estis disŝirita inter la sento ke mi preferus eskapi kaj kunpreni la infanojn per la unua disponebla aviadilo al mia onklino Ilonka en Aŭstralio, kaj inter la konscio ke Maca estas la patrino de ilia patro kaj do parto de ilia familio, kiu ankaŭ estas mia. Mi multe preĝis. Mi oferis miajn sentojn al la Sinjoro kaj vestis min iom pli varme, kiam ŝi ĉirkaŭradis malantaŭ mi malŝaltante la termostaton. Mi ignoris la televidilon kiel eble plej mi povis.

Sed de fojo al fojo esti humila sentiĝis malfacila. Iun vesperon ŝi spektis filmon pri la sanga grafino Erzsébet Báthory, kaj poste dum la sekvaj tagoj ŝi daŭre rigardetis min akuze kaj malfideme.

»Kia nacio estas tiuj hungaroj, entute?« ŝi subite demandis al neni aparte, dum ŝi estis fiksanta la tubon sur la polvosuĉilon. »Ili havas nenion komunan kun la ceteraj el ni ĉi tie.«

Mi helpis la infanojn eltranĉi kartonajn glavajn kaj ŝildojn kaj instruis ilin: »Tio estas ni! Hungarroj! Horrrrdoj da terrrrurraj hunnnnoj kun la akrraj norrdaj ventoj ĉe nia dorso! Ni trrrinkos vian sanngon!«

Ili ĝuis rapidi ĉirkaŭ la domo kiel hunaj hordoj: »Tllllinkos!« kriis Filip, saltante en la aeron, kun la kartona glavo dancanta mole en sia maneto.

### Oktobro

(...)

Oni disaranĝis min kaj la infanojn en unu ĉambron, dum Nino devis iri al la vira sekcio de la hospitalo.

»Kial mi estas malbone?« Astrid kuŝis en liteto kun barilo, ruĝa pro febro.

»Pro la papago,« mi klarigis. »Tiu, kiu mortis. Ĉar ni kisis ĝin.«

»Ĉu ankaŭ ni mortos?«

Ĉu ni kuŝos sur la planko kun kunpremitaj ungegoj, malpezaj kaj plumecaj?

»Ne,« mi diris ridete kaj karesis ŝian ŝvitan kapon. »Ni ricevos medicinaĵojn, kaj poste ni fartos bone kaj ni iros hejmen.«

Mi rigardis tra la fenestro al la konstruaĵo de la nova policakademio. Muskolaj junuloj en purpuraj ĉemizoj kaj pantalonetoj ekzerciĝis sur la neĝo, en la frosta vento. Junuloj kun lanugoj kreskantaj sur la lipoj, ili aspektis seriozaj, striktaj, ŝajnigante esti grandaj knaboj. La brilanta frosteto krakis sub iliaj piedoj. Ĉirkaŭ iliaj buŝoj floris malgrandaj nuboj de spiro. La akraj ordonoj sonis perdiĝantaj en la mola blankeco. Sinrulo. Pendotiro. Krurdisigo. Ekkaŭro. Bustolevo.

Puŝleviĝo. Strangaj vortoj, kiuj diras al mi nenion. Mi ankoraŭ ne eklernis tiun lingvon.

La patrina lingvo estas sankta.

La patrina lingvo, aŭ la patrino? Kiu do nun?

(...)

Dum kelka tempo mi nur restis staranta tie en la amara malvarmo kaj rigardis la glaciigintan draton. La kaĝo de mia papago, lia sekura, solida rifuĝejo estis malplena, morta, senŝirma.

Nino, vestita per vintra jako kaj trikita ĉapo, venis post mi kaj trenis min reen.

»Vi ne rajtas esti ekstere; vi ankoraŭ ne estas sana.«

Mi tremis.

»Kie estas Oliver?« mi ekkriegis. »Kie estas mia papago?«

»Ĉu vi silentos jam!« sibilis la maljunulinaĉo kaj kaptis mian tunikon. »Kion diros homoj?«

Ili puŝis min en la salonon.

»Forlasu tiun diablan teruran bildon,« Maca provis preni ĝin el miaj manoj.

Mi ĵuras, ke mi povus sufoki ŝin per miaj nudaj manoj. Por la unua fojo en mia vivo evidentiĝis al mi, ke mi kapablas mortigi homon. Sed mi faris nenion. Mi apogis min al la muro kaj glitis sur la plankon. Mi forte tenis la bildon. Mi sentis, ke miaj okuloj pleniĝas de larmoj kaj kolero.

»Ĉu vi leviĝos?!« klakis Maca. »Mi viŝis ĉiujn murojn.«

»Kien vi metis lin?«

Ŝi kunpremis la lipojn kaj rektiĝis. »Kio estas, tio estas,« ŝi diris. »Ĉesu bruadi. Ĉio estas via kulpo. Miaj nepoj estis en hospitalo dank' al vi kaj via obstineco. Nun vi hurlas pro iu senplumigita birdaĉo. Kunmetu vin.«

Ĉiuj kvar infanoj senparole staris iom for, rigardante min kun timo en la okuloj. Mi leviĝis.

»Mi daŭre ripetis al vi, ke vi ne alportu tiun aĉaĵon en la domon,« Maca ne intencis rezigni. »Rigardu do nun, kion vi kaŭzis.«

»Suzana, vi ja ne ploras pro ia papago. Vi ne estas infano.« Nino kapneis nekredeme rigardante min.

»Kial?« mi plorsingultis. »Li ja ne estis malsana!«

Kio estas, tio estas.

## Novembro

(...)

La flegistino klaĉis pri iu tra la telefono en lingvo, kiun neniuj komprenas. Se mi komprenus la hungaran, mi sentus kvazaŭ estus Somermeza Nokto, Nino iam diris. Kaj Dejan iam komentis: tial ni estas tiel bone en akordo kun ili, ĉar ni ne scipovas kvereli.

La pordo de la malsanulejo tuj malfermiĝis denove malantaŭ mi. La doktorino Esterhazy diris al la

flegistino Doris: »Mi faros nun paŭzon, dudek minutojn«. Ŝi ne rigardis min, nur kapjesis en mia direkto. Sed la flegistino – ŝi rigardis min. Ŝi prenis sian tempon, pesante min, kaj poste ŝi turnis sin kvazaŭ mi ne estus tie kaj trankvile daŭrigis paroli.

»Kiam vi vidas la edzinon, ĉio estas klara. Ŝi estas la sama. Ĝus-te sa-ma,« ŝi emfazis. »Nur dudek jarojn pli juna.« La voĉo ĉe la alia fino zumis ion reen.

»Ho, ne,« diris la flegistino ridante. »Estas evidente, ke ŝi ne scias. Ŝi devas esti stultega.«

Sekvis raporto pri tio, kiel iu renkontiĝas kun sia amantino, kaj kiel la amantino ne povas kaŝi sian feliĉon. La amantino estis doktoro Esterhazy, tio almenaŭ estis klara, ĉar la flegistino Doris rakontis al la virino ĉe la alia flanko de la telefono, kiel ŝi kaŝe trarigardis aĵojn de la doktorino dum ŝi forestis pro medicina konsiliĝo. Mi sentis min malagrabla, ke en mia ĉeesto iu ĉerpas plezuron el la doloraj detaloj de la vivoj de homoj, kiuj estas al mi fremdaj, sed samtempe estis tro interese por ne subaŭskulti. Mi malrapide pretiĝis min, surmetis mian kardiganon, butonumis mian mantelon, serĉis miajn gantojn. Estis iamanere trankvilige aŭdi, ke aliaj estas en pli malbona situacio ol mi, eĉ se ili mem tion ne scias.

Kaj, ĉu io mankas al vi? Maca diris de tempo al tempo, akuzante.

Estis vero ankaŭ tio, ke nenio mankis al mi.

Nun, kiam mi rakontas ĉi tion, tuj estas klare, pri kiu la flegistino parolis. Tiam, mi staris tie kaj pensis: kompatinda virino, ŝi tute ne scias, ke ŝia edzo trompas ŝin. Eble mi diris al mi: mi tuj scius, se Nino mensogus al mi. Li malamas mensogon tro multe por ne perfidi sin. Eble mi rememoris tion, kion mia amikino Mirjam iam diris: la vero estas por tiuj, kiuj ne povas toleri mensogojn, kaj mensogoj estas por tiuj, kiuj ne povas toleri la veron.

»Granda amafero,« diris flegistino Doris en la ricevilon, kun spureto da envio.

»Li skribis al ŝi leteron. Veran leteron kun koverto, poŝtmarkoj, rozkolora papero. Ŝi ne povas ĉesi tralegadi ĝin.«

La imagoj ekkirliĝis en la aero kaj falis unu post la alia sur la plankon, kie, formita el ili, aperis bildo.

/.../

Flegistino Doris lekis siajn dikajn lipojn. Ŝi ĝuis sian bravecon, ĝojante pri sia venko. Ŝi sidis antaŭ la edzino de karantania senatano kaj parolis la lingvon de la plej bonaj homoj: Erzi mama, avo Pál. Ŝi parolis pri sange doloraj aferoj, feliĉe konvinkita, ke estas neniuj en la proksimo, kiu povus kompreni. Fine ŝi remetis la telefonon kaj rigardis min kvazaŭ senkulpe. Ŝi leviĝis kaj tiris la paperfolion el la komputila presilo.

»Jen, por vi,« ŝi diris kun densa akĉento, tenante la folieton. Mi rektigis mian dorson kaj levis mian kapon kvazaŭ mi estus naĝanta al la surfaco. Ne forgesu, kiu vi estas! diris en mi la voĉo de mia bopatrino.

Mi direktis grandegan rideton al la flegistino.

»Remélem, hogy nem volt túl nehéz Önnék,« mi respondis. Mi esperas, ke tio ne estis tro malfacila por vi.

Flegistino Dorisz rigardis min sen ia ajn esprimeto. Estis kvazaŭ ŝia vizaĝo flosis en la aero kiel malbone ŝveligita balono. Poste, ŝiaj okuloj larĝiĝis. La karnomaso ekstremis. Ŝi leviĝis de malantaŭ la plasta skribotablo kaj stumblis. Ŝi kaptis sin je la ŝranko. Kion ŝi diris tiam en la hospitalo? »Se oni maldungos min el mia laboro, kion mi faru? Mi preferus pendumi min mem ol esti resendita.«

(...)

Mi kliniĝis malantaŭen.

»Nun mi komprenas, kial Nino postulis, ke la infanoj lernu la francan.«

»Nu, li ne prenos ilin al Kanado, pri tio vi povas certi. Tie restas nenio. Glacio.«

»Mi foriros,« diris mi serioze.

»Kien vi iros? Kun kio vi travivos?«

»Li ja estas devigita pagi alimenton.«

»En kiu mondo vivas vi? Tio nun estas for. La familio apartenas kune. Ili povas devigi vin. Ili forprenas viajn dokumentojn, viajn infanojn. Por tio ja vi batalis, vi kaj la viaspecaj.«

Mi kunpremis la lipojn. »Mi volis, ke ni havu verajn valorojn.«

»Kaj nun vi havas ilin.« Ŝi trinketis el la taso, rigardante min super la rando.

/.../

Mirjam ĵetis al mi kompatan rigardon.

»Vi devus pripensi, kion oni povus fari al vi mem. Demandu vin, ĉu vere estas nenio, kio povus meti vin en problemojn. En konfesejoj foje estas mikrofonoj, se vi ne sciis.« Mi pensis pri Dejan, pri Patro Matej. Sed mi neniam faris ion eraran. Ŝi observis min serioze.

»Estas bone, ke vi kontaktis min. Vi estas proksime al la supro, eble vi povas esti utila. Mi esperas, ke vi ne havas tiun fekon sub via haŭto.«

Mi kaptis mian brakon kvazaŭ por protekti ĝin. Ŝi kliniĝis antaŭen. Ŝi prenis mian pojnnon kaj tiris la manikon de la tuniko supren. La buleto klare videblis sub la haŭto de mia antaŭbrako. Ŝiaj okuloj renkontis la miajn.

»Kial?«

»Por ke li sciu, ke li povas fidi min,« mi diris kaj tiris mian manikon malsupren.

(...)

»Oni povas aŭdi onidirojn, ke la senato elektos vin kiel la venontan prezidanton de la Unio.«

Nino ridetas kiel homo, kiu neniam zorgas pri klaĉo. Li malfermas siajn grandajn, potencajn manojn. Ĉi tiuj estas manoj, kiuj inspiras fidon. Jen, mi tion faru, li diris kiam ajn mi rezignis je provado malfermi kruĉon da ruĝa beto aŭ acida rapo, kaj li elprenis ĝin de mia mano. Li apenaŭ tuŝis la kovrilon kaj ĝi faris la sonon de submetiĝo. Homoj diris: Atendu, ĝis Rifnik regos. Li ordigos la aferojn.

»Mia granda deziro estas labori por la avantaĝo de ĉiu civitano. Se tio montriĝas la plej bona maniero por tion fari, tiam tiu estas la vojo, kiun mi sekvos.«

Tra la ekrano flugas la subtekstoj de la samtempa traduko al la lingvoj de la Unio.

*Halandzsa.* Bla-bla-bla.

»Kion signifas prezidanto, panjo?«

»La plej grava viro en la tuta lando,« klarigis la avino.

»Ĉiuj devas obei lin. Kvazaŭ reĝo.«

»Ĉu paĉjo estos reĝo?« tuj demandis Astrid kun larĝaj okuloj.

»Jes ...« diras la reĝa patrino ridante. »Li fakte povus iĝi. La reĝo de Karantanio.«

La nura vera reĝo, kiun vi iam havis, estis hungaro, mi pensas.

»Familio,« diras senatano Rifnik.

Kaj: »Ordo.«

(...)

La vento puŝas sian vojon en la purpurajn faldojn de la mantelo. Jam estas glaciĝinta la vojo, la blondulino Katriina kun kavetoj en la vangoj kaj mi dummarŝe glitas iomete.

»Kien vi iras? Ni luas ĉambron en la proksimeco de Parko Tivoli, sed tio estas nur por nun, ni serĉas ion konstantan.«

Ĉi tiu estas la mondo, en kiu ŝi volas kreskigi siajn infanojn. Sen interreto aŭ televido, sen la danĝeroj de antaŭe. En la mondo, kie estas klare, kio estas ĝusta kaj kio ne.

Ŝi aspektas feliĉa kaj delikata.

»Do ni iru kune.«

Ŝi prenas mian brakon, kvazaŭ ni konus unu la alian jam delonge. Ŝi babilas kaj babilas.

»Ĉu vi scias kiom malmulte da katolikoj estis antaŭe en Finnlando? Malplej en Eŭropo. Nulo komo du procentoj. Antaŭ ol ekmalvarmiĝis, ni du translokiĝis al Kuopio por esti proksime de la preĝejo.«

»Kia estas Finnlando nuntempe?«

»Finnlando ne ekzistas plu. Nur kelkaj minejoj funkcias ankoraŭ.«

## Decembro

(...)

Mi mordis mian lipon kaj observis lin. Li parolis turninte sin al la muro, suprenigis iomete la ŝultrojn, kun la manoj ne kunpremitaj, movante la kapon. Por unu mallonga momento la interparolo ĉe la tablo ĉesis.

»Ili observas vin!« mi vekigis.

Ĉiu scias, diris flegistino Doris. Ĉu ĉi tiuj homoj sciis? Ĉu li kunportis ŝin al Varsovio? Ili ĉiuj scias, sed eĉ unu persono ne alproksimiĝis al mi por diri ion al mi.

En unu el tiuj tagoj Mirjam diris al mi: »Ne trodramigu! Ne provu reverki nun la historion de via pasinteco, en kiu li estas la plej granda kanajlo kaj mensogulo, kaj vi estas la plej granda viktimo. Al vi mankas nenio. Li donas al vi ĉion, kion vi deziras.«

Mi senkulpigis min kaj iris kaŝi min en la necesejoj, kie longa muro el speguloj en arĝentaj kadroj brilis super la lavpelvoj.

Maldikiĝinte, nun mi eĉ pli similis al Julija.

Estis kvazaŭ ŝi rigardus de la alia flanko, kvazaŭ ni starus ĉi tie, la bonkora ĝemelo kontraŭ la malvirta ĝemelo, kun siaj verdaj okuloj borantaj en miajn verdajn okulojn.

»Spegulo, spegulo, sur la muro, kiu estas la pli bela?« Mi atente observis la palan vizaĝon, la larĝ-okulan rigardon. »La veron, spegulo?«

Nino forte frapis la pordon.

»Ĉu vi estas tie? Ni foriras.« Lia voĉo estis kiel ordono.

»Kien? Ili eĉ ne alportis la kukon.«

»Mi klarigos al vi ekstere. Lavu viajn manojn.«

»Kio okazas?«

»Tuŝu nenion kaj restu kiel eble plej malproksime de homoj.«

Li preteriris min kaj nerveze frotis siajn manojn per sapo en la marmora lavpelvo.

»La edzino fartas malbone,« li diris al la homoj ĉe la tablo. Inter vokoj de »Certe vi ne jam foriras!« kaj »Ni pagos meson por ke estu alia filo«, ni rapidis al la garaĝoj. Li dolore premis mian antaŭbrakon.

»Kio okazas, Nino? Ĉu al iu el la infanoj estas malbone?«

»Ne al la infanoj, sed al ĉiuj. Al ĉiuj homoj. Estas io malĝusta kun la tuta fika mondo. Io en la aero. Homoj falas kiel muŝoj.«

»Kion vi volas diri?«

»Ili mortas, diable!« Li malfermis la pordon de la Pigmaliono. »Homoj estas mor-tant-aj, Suzana! Pluraj miloj mortis jam kaj neniuj scias, kial.«

»Kiu mortis? Kie?«

Kiel mi ne tuj komprenis lin, mi demandas min nun. Kiel mi ne tuj sciis, kion signifas la malvarmaj lagoj da korpoj?

»Ne, ne estas iu veneniĝo. Gravegas,« li diris en la aeron antaŭ si, fikstente la stirilon. »Tio ĉi ne estas nur paniko.«

La radio avertis pri fortaj ventoblovoj, kiuj plifortigos dum la nokto. Estis kvazaŭ la vento klopodus movi la pezan aŭton tien kaj reen.

Kvankam mi hontas, mi konfesos al vi la unuan aferon pri kiu mi tiam ekpensis. La pesto, mi diris ene, tio signifas la infektoklinikon. Doktorino Esterhazy havos manojn plenajn je laboro. Nun ŝi ne havos tempon por enmiksiĝi en la familiojn de aliaj homoj. Eble ŝi mortas.

Tion mi volas por Kristnasko, mi preĝis survoje hejmen. Ke Julija mortu. Nur tion.

(...)

La vento eniris la domon pere de pikoj de malvarmo.

»Kien vi pensas, ke vi iras?« ekkriis Maca. Mi frapfermis la pordon malantaŭ mi.

Mi kuris laŭ la Vojo de Maria, kiu iam nomiĝis la Vojo de Memoro kaj Kamaradeco.

Kie li estas? Kion ili faris al li?

Kiel mi povus esti tiel stulta?

*Ni parolas pri vi nun, ne pri mi, Žuži.*

Informanto, membro de iu ĉelo konspiranta kontraŭ la ŝtato, spiono. Estas Anton Rifnik, kiu interesas lin. Ne miaj infanoj. Ne mi, Suzana.

Estis mi, kiu malkaŝis al li pri la magazenoj en la Kavoj de Postojna! Kion alian mi rakontis al li? Ve Dio! Mia cerbo sentiĝis kvazaŭ frostiĝinta. Eble ĉio estis ia miskompreno, eble li vokos min, atentos min malantaŭ la domo, por ke mi ŝteliru kun la infanoj preter Maca al lia aŭtomobilo, ni veturos al la flughaveno kaj forflugos kune. Eble la polico ĉasos nin, kun siaj sirenoj bruegaj, sed estos tro malfrue. Liaj kamaradoj blokos la policon antaŭ la flughaveno kaj Dejan rakontos al mi, ke ekde la komenco ĉio estis nur ludo, zorge antaŭplanita, destinita nur por savi min. Mi estos lia por ĉiam.

(...)

Kiam mi denove trapasis la ĉefan enirejon en la frostan vesperon preter la maldika figuro de Pastro Viljem, vestita en kapoto kaj kun la manoj ĉirkaŭantaj sian korpon pro la malvarmo, li dekroĉis sin de la homamaso. Mi vidis lin el angulo de okulo.

Certe li ne sekvas min? mi pensis nerveze. Mi rapidigis mian paŝon.

Sur mia alia flanko, iu decide kaptis mian brakon. Mi bruske turnis min. Estis la fortika Patro Mihael, kiu en

sia robo memorigis japanan luktiston. Ambaŭ figuroj troviĝis apud mi: Mihael je unu kaj Viljem je la alia flanko. Mi senparole iris daŭre antaŭen kun ili. Viljem direktis min per sia mano al la paroĥa domo, kie la alta kaj bonhumora Matej sidis ĉe la flava skribotablo trinkante kamomilan tizanon. La granda ĉambro odoris je mielo kaj citrono.

»Dio estu kun vi, Suzana,« li diris per amika voĉo kaj invitis min per manmovo: »Sidiĝu!«

Mi restis staranta.

Viljem kaj Mihael sidiĝis sur la ruĝajn remburitajn seĝojn ambaŭflanke de la pordo.

Matej rigardis min malgaje, dum li kirlis sian tizanon per arĝenta kulereto. La metalo tintis agrable kontraŭ la porcelano.

»Ve, Suzana.« Li balancis la kapon.

»Kio, patro Matej?«

Li malfermis tirkeston kaj prenis el ĝi malgrandan nigran butonon, kiun li sekve metis sur la skribotablon.

»Sidiĝu, sidiĝu,« li invitis min denove. Mi eksidis.

Per la fingropinto li tuŝis la aparateton sur la skribotablo kvazaŭ ludante per ĝi. Liaj ungoj estis tonditaj ekstreme mallongaj.

»Vi ne estis tute sincera, ĉu, Suzana?«

Mi diris nenion. Matej malgaje balancis la kapon. Li estis seniluziigita pri mi.

»Vi ne diris al mi pri Dejan Rejec.«

»Kion pri li?«

(...)

Mi volis telefoni al Nino, por diri al li.

Mi volis telefoni al Dejan, por diri al li.

Mi apogis min al la rando de la lavpelvo kaj kun mia menso malplena rigardis la gutojn falantajn el la krano. Mi ne estis mortonta. Ne tute. La du viroj, al kiuj mi fidis – kiom ili perfidis min!

La tuta Lakta Vojo kliniĝas al sia malluma flanko. Vi ne povas sidi kaj atendi, ke iu alia riparu vian mondon por vi. Grati, tiri, elfosi ĉion. Kaj kio restas? Se mi decidiĝos al batalo, mi estos sola. Tute kaj tute sola. Kontraŭ ĉiuj. Neniu staros apud mi.

Mi ankoraŭ tenis en la manoj la malgrandan rondan spegulon de Oliver kun ĝia rozkolora plasta kadro. Mi movis ĝin tiel ke ĝi reflektis unu parton de mia vizaĝo, kaj poste la alian. Mia vizaĝo estis hela unuflanke, malhela aliflanke.

Tien-reen. Tien-reen. Kvazaŭ mi estus ludanta ŝakon kontraŭ mi mem.

Foje mi estas la blanka reĝino, foje mi estas la nigra reĝino.

La nigra-purpura-blanka reĝino.

La turo.

Peonino.

(...)

Tiam venis de la estraro nova mesaĝo al la civitanoj. Ĝi estis tiel grava, ke ĝi estis elsendita el la ĉefa studio en Pollando.

»Dekreto de la Senato de la Kristana Unio: por la rajto de transirado de la limoj de la Kristana Unio virinoj de ĉiuj aĝoj devas pagi kaŭcion de cent mil talentoj; viroj de ĉiuj aĝoj pagas kaŭcion de kvindek mil talentoj La dekreto ekvalidas tuj.«

Jadviga, Astrid, Filip, Julijan, mi. Kvarcent mil talentoj. Kiom da mono mi havis kaŝitan en la ludilo-kolombo?

»Kial vi faris tion?« Mi demandis Nino'n, kiam li vespere venis el sia oficejo. La infanoj ĵetis sin sur lin.

»Por ke vi ne forkuru de mi,« li diris ludeme kaj ĵetis Filipon en la aeron, kaj Filip ekridis kiel tintantaj sonoriloj.

(...)

»La senatano Rifnik estas mia edzo.«

Li mallerte retropaŝas.

»Kaj elprenu tiun maĉgumon el via buŝo.«

La virino rektiĝas, kaj ŝi elkraĉas en mia direkto. Ŝia kraĉaĵo kraketas en la aero.

Ili ĉirkaŭas ŝin.

»Dokumentojn!« diras al ŝi tiu kun la belaj okuloj. Lia voĉo rompiĝas kiel tiu de knabeto.

Mi iras, mi ne rigardas malantaŭen. La voĉoj perdiĝas kun la vento.

Mi aŭdas: »Nigro estas la koloro de la diablo.«

Kaj: »Sur viajn genuojn!«

Malantaŭ mi mi aŭdas pafon, kiun sekvas silento, kaj tiam mi aŭdas senspiran voĉon, kiu transdonas admiron. Ĉi tiu voĉo estis pli profunda. Mi pensas, ke ĝi diris:

»Frato, vi fakte pafis ŝin.«

Mi ne rigardis. Mi rigardis pingvenidon vagi perdis en la strato kaj mi ne turnis min. Eble ĝi estis serĉanta sian panjon.

Tio estus bona bildo por aŝiŝo. Suzana paŝas laŭ la glacia strato Ĉop, malantaŭ ŝi sekvas la strangaj trupoj, kiuj en la malklara distanco kreskas en armeegon. En la fono de la bildo Kristnaskaj lumoj lumigas la silueton de la pendumito, kaj sur la tero ni vidas la korpon de virino kun sango elfluanta el ŝia kapo. Suzana rigardas malantaŭen en zorgo, ŝi fuĝas, sed la armeo sekvas tien, kien ŝi kondukas. Ŝiaj vangoj estas rozkoloraj pro la malvarmo kaj ŝiaj okuloj pli verdaj ol ili estas en la realo. Ŝi aspektas bela en sia purpura mantelo.

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj

## Milan Škrlić 1935 – 2024



17. oktobra 2024 smo se poslovili od dolgoletnega esperantista in zavzetega člana EDL Milana Škrlića. Zадnja leta je bil član IO EDL in leta 2021 izvoljen za praporščaka. Žal te zadnje funkcije ni mogel nastopiti zaradi prometne nesreče, pri

kateri je utrpel tako hude poškodbe, da je moral ponovno osvojiti osnovne gibalne in komunikacijske sposobnosti. Milan je v društvu pod vodstvom Toneta Logarja opravil izpit iz esperanta po metodi Cseh že leta 1954. Po daljšem bivanju izven Slovenije se nam je ponovno pridružil in bil aktiven zlasti na področjih turizma (prevodi prospektov) in čebelarstva (članki, pojmovnik). Upali smo, da bomo nekatere projekte še skupaj dokončali, a ga je višja sila nepričakovano iztrgala iz naše sredine. **O.K.**

## Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia tago de edukado, la 24-a de januaro

Edukado, homaj rajtoj kaj lingva justeco... Okaze de la Internacia Tago de Edukado, ni atentigas pri la fortaj ligoj inter tiuj tri aferoj. Edukiĝo estas homa rajto: la 26-a artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj asertas, ke elementa edukado estu senpaga kaj deviga, kaj ke "teknika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla ... por ĉiuj laŭ ties meritoj." Per edukado oni gajnas la kapablon kompreni, postuli kaj ĝui la aliajn homajn rajtojn.

Edukado okazas pere de lingvoj: oni devas scipovi difinitan lingvon por edukiĝi per ĝi. Leviĝas fundamenta demando: per kiuj lingvoj infanoj lernu? Lernado, precipe je baza nivelo, okazu prefere per la denaska lingvo de la lernanto, aŭ, minimume, la lernanto laŭrajte ricevu la rimedojn necesajn por atingi plenan komprenon de la instrulingvo.

Unua prioritato de la edukaj instancoj estas do liveri instruon per lingvoj komprenataj de la lernantoj: sen lingva justeco ne povas ekzisti efika

edukado, kaj sen edukado ne povas ekzisti plenaj homaj rajtoj.

Nur respekto al ĉies lingvoj povas akceli tiun "plenan disvolvon de homa personeco", kaj antaŭenigi tiujn "komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj", kiujn celas tiu sama 26-a artikolo de la Universala Deklaracio.

Lingvaj homaj rajtoj estas fundamentaj por tia edukado, kaj ankaŭ rolas kiel vojo por konservi homajn decidkapablojn en mondo de aŭtomatigo kaj artefarita inteligento. Plene edukita civitanaro estas esenca por nia estonteco.

En decembro 2024 Universala Esperanto-Asocio festis per internacia konferenco en Montevideo, Urugvajo, la 70an datrevenon de la Rezolucio de Unesko pri Esperanto, kiu en 1954 starigis rilatojn inter Universala Esperanto-Asocio kaj Unesko, kaj sekve kunlaboron inter la du organizoj pri lingvaj homaj rajtoj. Okaze de la Internacia Tago de Edukado 2025, ni promesas nian daŭran kunlaboron por edukado en ĉiuj lingvoj, kaj por interkompreniĝo kaj proksimiĝo de la popoloj de la mondo ankaŭ per la Internacia Lingvo Esperanto.

**Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 1205**

## KER C2 ekzamenoj

Bedaŭrinde, Slovenujo devos atendi iom pli longe je la unua persono, kiu povas fanfaroni pri trapaso de la C2-nivela ekzameno. La 23-an de novembro 2024 du kandidatoj el Slovenujo (Peter Grbec kaj Thomas Kobilšek) faris la C2-nivelan Esperanto-teston. Ambaŭ jam sukcese trapasis la ekzamenon de la C1-nivelo. Je la C2-nivelo, Peter Grbec prenis nur la skriban parton, dum Thomas Kobilšek faris la ekzamenon en ĝia tuteco (skriba kaj parola). Bedaŭrinde, al ambaŭ kandidatoj mankis nur kelkaj procentoj ĝis 60% da poentoj por sukcese trapasi la C2-ekzamenon. **P.G.**

## Objave v tisku

**Delo** je 21. oktobra objavilo pismo bralca Janeza Zadravca Kluglerja iz Maribora z naslovom *Razmislek o zamujenih priložnostih v OZN*. Avtor pisma je slikovito opozoril na primere jezikovne neenakosti in zanemarjanja te ĉlovekove pravice od domovine preko EU do OZN, pa tudi na hlapčevstvo nekaterih naših vidnih govorcev. Vredno je prebrati članek,

povezava pa je <https://www.delo.si/mnenja/pisma-bralcev/razmislek-o-zamujenih-priloznostih-v-ozn.>

**Delo** je 30. oktobra 2024 objavilo z naslovom *Primož Trubar lahko mirno počiva ...* pismo bralca Janeza Zadravca Kluglerja iz Maribora. Ost prispevka je usmerjena v slovensko jezikovno politiko, ki uvaja obvezno učenje angleščine od prvega razreda osnovne šole dalje. Objavo si lahko preberete v slovenščini na spletu s povezavo <https://www.delo.si/mnenja/pisma-bralcev/primoz-trubar-lahko-mirno-pociva>, prevod v esperanto z izvirnim naslovom *Ŝtiriindvajset jezikov, ena Evropa* pa v naši današnji rubriki *Komentiramo / Ni komentas*.

**Delo** in **Dnevnik** sta 9. decembra 2024 objavila pismo bralca Janeza Zadravca Kluglerja ob obletnici sprejetja Splošne deklaracije o človekovih pravicah z naslovom *Čas je za izjavo o jeziku. Mišljena je izjava, da se kot posameznik odpovedujem vsiljevanju svojega jezika v mednarodnem sodelovanju, istočasno pa kot znak spoštovanja do sogovornika za enakopravno sporazumevanje uporabljam mednarodni jezik esperanto kot skupni drugi jezik*. Ta izjava je nastala okrog leta 1972 med jugoslovanskimi esperantisti, ki so želeli prispevati k odpravi jezikovne neenakopravnosti. Dokument je bil kot Deklaracija sprejet na Predsedstvu Jugoslovanske zveze esperantistov in je imel zanimiv odziv tako v Sloveniji (RK SZDL) kot v Beogradu leta 1973 na Svetovnem kongresu esperantistov v pozdravnem govoru pokrovitelja kongresa. Članek lahko poiščete s povezavo <https://www.dnevnik.si/mnenja/odprta-stran/cas-je-za-izjavo-o-jeziku-ob-obletnici-splosne-deklaracije-o-clovekovih-pravicah-2706562/>.

**Radio Koper** je v rubriki *Dopoldan in pol* 15. decembra 2024 objavil 6-minutni intervju s Petrom Grbcem z naslovom *Esperanto? Jezikovna enakopravnost!* Novinarka Anita Urbančič je v uvodu zelo zanimivega pogovora na kratko opisala prireditev Zamenhofov dan v Izoli. Povezava na posnetek je: <https://radiokoper.rtvsl.si/podkast/dopoldan-in-pol/173250483/175094513>

**Primorske novice** so 17. decembra 2024 v rubriki *Istra* objavile članek Lučke Lešnik in sliko o proslavi Zamenhofovega dne v Izoli. S klikom na naslov članka si ga lahko preberete sami: [V Izoli poklon](#)

[“očetu” esperanta Ludwiku Zamenhofu - Primorske novice.](#)

**Radio Koper** je v rubriki *Dopoldan in pol* 24. decembra 2024 objavil 5-minutni intervju z Ano Ferrer Zadavec in Janezom Zadavcem z naslovom *Ano in Janeza je povezal esperanto*. Novinarka Anita Urbančič je pogovora posnela na proslavi Zamenhofovega dne v Izoli. Zlata esperantska zakonca sta opisala svojo življenjsko pot in vlogo esperanta v njunem zakonu. Povezava za posnetek: <https://radiokoper.rtvsl.si/podkast/dopoldan-in-pol/173250483/175096729>

## Esperante Eŭropen: Mia vojaĝo al la malkovro de Esperanto

Mia nomo estas Gabin. Mi estas 25-jaraĝa esperantisto el Nanto, Francujo, kaj aktivulo de JEFO kaj TEJO.

Antaŭ du jaroj kaj duono mi decidis lerni Esperanton por entrepreni grandan aventuron: petveturi tra Eŭropo kaj gastigi ĉe esperantistoj per Pasporta Servo, samtempe pliprofundigante miajn konojn pri la lingvo kaj la movado.

Dum mia vojaĝo, kiu finfine daŭris pli ol ses monatojn, mi trairis 20 landojn, ĉeestis 5 eventojn kaj pasigis 85 noktojn ĉe Esperantistoj. Ĉiun paŝon de mia vojaĝo mi dokumentis per filmetoj. Nun disponeblas longa dokumentfilmo pri mia sperto: <https://youtu.be/6m3Ffodblyk>.

La celo de mia dokumentfilmo estas pruvi, ke Esperanto funkcias kiel internacia lingvo kaj ke ĝi ofertas al junuloj kiel mi fenestron sur la mondo, pere de kiu oni povas vojaĝi, interkompreniĝi kaj amuziĝi. La dokumentfilmo reprezentas mian personan dankmesaĝon al esperantistoj, kiuj subtenis min dum la vojaĝo, kaj ĝi celas motivigi ne-esperantistojn lerni Esperanton kaj konatiĝi kun la movado. Por ke ne-esperantistoj povu ĝui la filmon, jam disponeblas subtekstoj en 10 lingvoj!

Mi estus ege danka, se vi povus helpi tiun ĉi projekton per spektado kaj ĉefe per disvastigado al viaj asocioj kaj lernantoj. Mi ankaŭ disponeblas por prezenti la dokumentfilmon dum viaj eventoj (ĉeeste en Eŭropo kaj rete en aliaj kontinentoj).

Koran dankon kaj ĝis baldaŭ en Esperantujo!

(Gabin retpoŝte)

## Virtuala Kongreso de Esperanto



Dum la 5-a Virtuala Kongreso de esperanto (28-a novembro ĝis 1-a decembro 2024) okazis programero, prizorgita de Eŭropa Esperanto-Unio, Eŭropo-Demokratio-Esperanto kaj la Komisiono por agado en Eŭropo de UEA. La virtuala

kunveno, nomita *Esperanto en Eŭropo, Esperanto por Eŭropo*, prezentis planojn kaj eblojn por la poresperanta agado en kaj por Eŭropo, aparte por Eŭropa Unio.

La kunvenon, kiun stiris kaj kunligis la sekretario de EEU Luigi Fraccaroli, partoprenis iom pli ol 20 esperantistaj geaktivuloj el Eŭropo, inter ili Janez Jug el Slovenujo. La enkondukan paroladon donis la prezidanto de EEU Seán Ó Riain, pluigis la prezidanto de EDE Pierre Dieumegard, István Szabolcs el Hungarujo kaj Jozef Reinvarit el Slovakujo.

Tiuj el vi, kiuj ŝatus (re)vivi la interesajn prezentojn kaj la diskutojn, bonvolu spekti la jenon ĉe Jutubo (daŭro 1<sup>h</sup>6<sup>m</sup>) per la ligilo:

<https://youtu.be/upnwlXfWunY?si=zagoM3HFncUuZQkC>. **O.K.**

## Helpu plibonigi Slovena-esperantan vortaron

La portalo Termania ebligas kunlaboron de uzantoj. Al ĉiu vortara artikolo estas eble aldoni komenton. Uzantoj de Slovena-esperanta vortaro povas aldoni komenton pri eraro aŭ proponi plibonigon. En 2024 nur tri uzantoj aldonis 27 komentojn: Ostoj Kristan 10, Andrej Žumer Skribas 9 kaj Gregor Markič 8. Ili kontribuis 17 akceptitajn kaj 10 rifuzitajn komentojn. **J.J.**

## Kion oni legos en la sekvonta numero?

Por la sekvonta numero de *Informacije / Informoj*, kiu aperos fine de marto 2025, ni antaŭvidas raportojn pri la vintraj aranĝoj en Esperantujo, konvenoj ktp. Krome el nia agado:

- eldono de slovena porinfana libro
- aliĝoj por la UK 2025 en Brno
- nova ekipaĵo por la oficejo de ES Ljubljana
- katalogo de la arĥivo de SIEL
- historiaĵoj de nia movado ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri viaj agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj rimarkoj, kiuj povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. **O.K.**

Pa ŝe to....

Kaj ankaŭ tion ĉi...



**INFORMACIJE / INFORMOJ** izdaja / eldonas Zdrufenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Grabloviĉeva 28, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo. <http://www.esperanto.si>. Matična št. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni račun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d. d.. (Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoj Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaž Longyka.

**ISSN 2385-992X** Naklada / eldonkvanto: 60

**ISSN 2385-9628** URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>